IF EF


N° 01 1973


G.L. GIMELLI


# ITALA fervojisto

**Organo Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti**









IFEA

## APPELLO DEL CASSIERE

A tutti i Soci dell'I.F.E.A. che non hanno ancora versato le quote sociali per gli anni 1972 e 1973. Nella speranza che si tratti di una dimenticanza ripetiamo il nostro invito: spedite subito la vostra quota per aiutare l'Associazione.

Coloro che non intendono rimanere iscritti e continuano a ricevere il Bollettino vogliano inviare le loro dimissioni affinché non paghiamo, anche per il 1973, la loro adesione alla Federazione Internazionale. Grazie!

## !!! JUBILEA IFEF-KONGRESO EN AARHUS !!!

LA 25-a IFEF-KONGRESO okazos en Aarhus de la 12-a ĝis la 18-a de majo 1973-a. Adreso de la Kongresejo: Hotelo Mercur, Viby torv, DK-8260 VIBY J. (Danlando).
La Loka Kongresa Komitato jam longe laboras por aranĝi Vian ĉeeston plej eble plej agrabla. Multaj altranguloj honorigas nian kongreson per akcepto de la enirado La Honoran Kongresan Komitaton. ESTU KORE BONVENAJ AL NIA JUBILEA IFEF-KONGRESO.
Konstanta adreso: 25-a IFEF-Kongreso. Assensgade 18.
DK-8000 AARHUS C. Danlando.

Bankkonto: 25-a IFEF-Kongreso, bankkonto n-ro 803.547, Privatbanken Aarhus, Viby afd. DK-8260 VIBY J. Danlando.

Poŝta ĝirkonto: 25-a IFEF-Kongreso, Tousparken 9, DK-8230 AABYHØJ. Danlando Poŝta ĝirkonto n-ro 20 31 50.

Kongreskotizo: Post 1.2.1973: 96 danaj kr. Familianoj, pensiuloj kaj gejunuloj ĝis 20 jaroj - la duonon. Simpatiantoj: minimume 20 danajn kr.

Ne forgesu la kongresajn glumarkojn: Vi povas aĉeti ĉe la kongresa kasisto: 10 glumarkoj kostas 2 respondkuponojn inkluzive afrankon. Folio kun 25 glumarkoj kostas danajn kr. 2,25 plus afrankon.

Honora Kongresa Komitato

Ĝenerala prezidanto de F.I.S.A.I.C., D-ro Emile SCHLESSER - Luksemburgo
Ĝeneraldirektoro, cand. jur. Povl HJELT, D.S.B.
Personarĉefo, E. Rolsted JENSEN, D.S.B.
Kontorĉefo, Roland CHRISTENSEN, Bonfarkontoro, D.S.B.
Staciestro, T. H. NIELSEN, AARHUS H.
Urbestro, Orla S. HYLLESTED, AARHUS
Urba konsilisto koncerne kulturajn aferojn, Thorkild SIMONSEN, AARHUS
Turistĉefo, S. Hempel JØRGENSEN, AARHUS
Prezidanto de D.J.I.F., Aage JOHANSEN, KOPENHAGO
Prezidanto de kultura Sekcio de D.J.I.F., Vicprezidanto de F.I.S.A.I.C., Gunnar AARSLEV, AARHUS
Prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo, Ib SCHLEICHER, KOPENHAGO
Prezidanto de Dana Laborista Esperanto Asocio, Aage BENSE, KOPENHAGO
Prezidanto de la fervojista komunkomitato, urbestrarano Hans JENSEN, AARHUS

Loka Kongresa Komitato "L.K.K."

Prezidanto: Ingvard KENSING. Vicprezidanto: Henning HAUGE. Kasisto: Knud FISKER. Helpkasisto: Anders KLAUSEN. Informejo: Frede JENSEN. Loĝado: Villy BRAENDSTRUP. Gazetara servo: Birgit JENSEN kaj Henning OLSEN. Ekskursoj kaj vizitoj: Frederik NIELSEN. Libro servo: Robert MIKKELSEN. Sonbendservo kaj protokolanto: P.A. JAKOBSEN. Junularaj aferoj: Stanislaw MIELCSAREK kaj Tova BAK.

Internacia Bridĝkonkuro kaj Ŝakturniro: Dum la 25-a IFEF-Kongreso la danaj bridĝ- kaj ŝak-ludantoj fervojistaj aranĝas 6-horajn bridĝkonkuron kaj ŝakturniron inter la gekongresanoj kaj la aarhusa bridĝ- kaj ŝak-klubo fervojista.

Filatelio: Dum la 25-a IFEF-Kongreso funkcios en la kongresejo aparta poŝtoficejo. Vi povos aĉeti specialajn kongreskovertojn.
Ni petis pri speciala kongresa poŝtstampo.

Piedpilk-maĉo: Dum la 25-a IFEF-Kongreso oni aranĝas internacian piedpilkmaĉon inter la kongresanoj kaj la aarhusaj fervojistoj.
Fakprelegoj: Dum la 25-a IFEF-Kongreso estas antaŭviditaj fakprelegoj: de D-ro W.Bormann, Hamburgo; temo: Eŭropa fervoja politiko en la Komuna Merkato, dimanĉe, kaj de Gunner Thuesen, Kopenhago; temo: Danaj Ŝtataj Fervojoj kiel ŝipkompanio, kun filmoj. Ĝi okazos vendrede la 18-an de majo.
Folklora vespero pri Gronlando estas antaŭvidita ĵaŭde la 17-an de majo.
Esperant-lingvaj broŝuroj pri Aarhus: Ni dankas pro la multaj mendoj, ĉe la turistoficejo kaj ĉe L.K.K., de la esperant-lingvaj broŝuroj pri Aarhus. La stoko nun estas elĉerpita, sed en februaro 1973-a la turistoficejo presigis novan stokon, kaj ni tre ĝojus, se vi denove turnos vin - prefere al la turistoficejo.

POSTKONGRESO EN KOPENHAGO, 19 - 21 majo 1973-a

Ĉar temas pri Jubilea Kongreso ni petas al la kongresanoj: restu en la kongresurbo Aarhus ĝis la fino de la kongreso vendrede la 18-an de majo, kie ni aranĝos vesperon, dum kiu fervojistoj distros kaj amuzigos fervojistojn, kaj la IFEF-Prezidanto fermos la kongreson.
La postkongreso en Kopenhago komenciĝos sabate la 19-an de majo je la 13-a horo, kaj la plej bona kaj agrabla vojaĝo al Kopenhago estos sabate matene je la 8-a horo.

L.K.K. de la 25-a IFEF-KONGRESO

## 5-a INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO

Okazos de la 17-a ĝis la 24-a de aprilo 1973 (Pasko) en Berchtesgaden, germana urbeto apud aŭstria landlimo vid' al vide al Salzburg, fare de la Germana kaj Aŭstria Esperanto-Junularo. Temo: La laboro en la amasmedioj.
Programo: Dancado kun Esperanta disk-ĵokeado. Gvidado tra la urbo Salzburg. Vizito al ĵurnalo "Salzburger Nach-richter". Vizito al radio studio en Salzburg. Esperanto-kursoj. Laborgrupoj k.t.p.
Por informoj: Anton Oberndorfer, Wiesingerstr. 15 A-4600 Wels (Aŭstrio)
Michela Lipari, Via Padova, 15 I-28100 Novara (Italio).

## SCIIGO DE I.L.T.E. "INTERNACIA LIGO DE TRAFIKISTOJ ESPERANTISTOJ

Laŭ informoj de Bulgara sekcio al nia Centro. La Bulgara sekcio ĉe ILTE disponas pri senpagaj esperantaj loĝejoj en Sofia por gastoj-geesperantistoj membroj de ILTE, dum la tuta jaro. La sekcio povas ricevi kaj disloĝigi grupon de 20 personoj. Ĉiu povas resti laŭvole. Pri vizito oni devas skribi unu monato antaŭ la alveno en Sofio. Pri ĉiuj informoj skribu al adreso: Bulgario, Sofio, P.K. 930.

La Komitato

## 14-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO 1973-a

La 14-a I.F.E.S. okazis ĉijare en la montara domo "Strussing" ĉe la urbeto Werfenweng en Aŭstrio. Partoprenis pli ol 50 gefervojistoj el 8 landoj.

Ni kvankam ne skiantoj kaj ne kutimaj al montaro, travivis neforgeseblan semajnon kune kun la gejunuloj sur la neĝo. Tiu kunesto eble iom junigis nin. Koran dankon al amiko Geroldinger kiu majstre gvidis la tutan aferon.

Rimarkindaj estas la multnombraj donacoj kiujn li akiris por premii ĉu la skiantojn, ĉu la piedirantojn, ĉu la lingvajn spertulojn ĉu la komencantojn.

Post multaj I.F.E.S. en Aŭstrio (nur po unu fojo ĝi estiĝis en Ĉehoslovakio, Francio kaj Germanio) oni okazigos la venontajn skisemajnojn en Jugoslavio, Francio kaj Italio.

Delvina kaj Germano

## A N O N C O

Kolego Zbigniew Wachowski, str. Żmudzka 15/58 85-028 BYDGOSZCZ (Pollando) deziras korespondi kaj interŝanĝi filateliajn valorojn.

RADIO ROMA - ESPERANTO, Casella Postale 320, I-00100 ROMA (Italujo).
La elsendoj okazas ĉiun dimanĉon, de la 21-a horo ĝis la 21-a kaj 20 minutoj, laŭ mez-eŭropa tempo, sur tri ondlongoj, respektive je metroj 30,90 - 41,24 - 50,08, tio estas kilohercoj 9.710, 7.275, 5.990. La unua parto de ĉiu dissendo temas pri "Novaĵoj el Italujo", kaj de tempo al tempo pri "Leterkesto". La dua parto temas pri "Kuriero de Esperanto".